

# esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ☆ 4/2001  
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ☆ Aŭgusto 2001

Look inside for:

President's message	2
NASKa raporto	3
From the CO	4
Tapes & videotapes	5
New from the Book Service	7
Recenzoj	
<i>Originalaĵoj</i>	8
Esperanto in the media	10
Decido de la kongreso	11
Five most wanted	11
<i>plus</i>	
Ktp!	6

The Esperanto Movement has always espoused the goal of connecting people across national barriers. Today we inhabit a new era of communication, in which it is possible to send data faster and farther than ever before. Yet half of humanity has never made or received a telephone call. A yawning digital divide cuts many poor countries off from the resources of information technology. The United Nations, in partnership with civil society and the private sector, is determined to bridge that gulf. (From the Message of UN Secretary-General to the 86<sup>th</sup> World Esperanto Conference, Zagreb, July 2001)

## SALUBRA LANĈO EN SALURBA LANDO

la 49-a Jarkongreso de ELNA

David C. HALLEY

Mi ne vizitis Sallagurbon aŭ Utahon antaŭe kaj mi ne sciis kion atendi. Mi trovis belan regionon kun tre afabla kaj amikema loĝantaro. Kaj la LKK kaj la ŝoforoj kaj la deĵorantaj studentoj estis helpemaj, informplenaj kaj agrablaj. Eĉ la vetero estis preskaŭ perfekta; ĝi estis varmeta kaj sunplena, sed ne tro.

Vendrede mi alvenis kaj spionis kaj fotis la Estraran kunsidon, kaj skoltis la ĉirkaŭaĵon. Post vespermanĝo okazis la Interkona vespero. Ni babiladis iom da tempo, post kio Amanda Higley iniciatis interesajn kaj amuzajn ludojn, kiujn ĉiuj ŝatis.

La Kongreso oficiale komenciĝis sabate per la Solena malfermo. Poste okazis du programoj samtempe, kiel kutime. La unuaj estis Skiza historio de ELNA, de Bill Harmon kaj Gazetara konferenco. Poste, d-ro Abdul Salam, blindulo de Hinda Unio, parolis pri la HELPO-Fondaĵo kaj d-ro Robert Blair prezentis Enkondukan kurson en Esperanto.

Post tagmanĝo, d-ro Salam revenis kun Jogo por ĉiuj kaj Amanda Higley parolis pri E-vojaĝado testud-stile. Poste okazis Aferkunsido dum Tim Westover kaj Lee Miller parolis pri Reta eldonado. Lusi Harmon prezentis la videokurson *Pasporto al la tuta mondo* kaj Grant Goodall parolis pri Kiel instrui per *Pasporto*; samtempe Anarie White kaj Camilla Thomas parolis pri Hejmlernado. Poste okazis kaj Akcepto por UEA-delegitoj kaj promenado tra la Ĝardenoj sur la Ruĝa Platmonteto (Red Butte) kaj spektado de *Inkubo*, filmo en Esperanto, kun William Shatner, en DVD-formato. Vespere okazis la bankedo. Post la bankedo, ni ĝuis muzikan programon de la familio Kuzmich, kies membroj ludis violonojn, pianon kaj aliajn instrumentojn.

Dimanĉe, ni ekskursis al Templu Placo, kie ni aŭskultis la mondfaman Mormonan Tabernaklan Ĥoron. Kiam mi estis junulo, praepoke, mia patro aŭskultis tiun ĥoron ĉiun dimanĉon. Ĝi aspektas preskaŭ sama, kun kelkaj modernajoj.

En la unuaj programoj de la posttagmezo, Orlando Raola parolis pri Esperanto kiel nura ilo; kiun rolon ni proponu al ĝi?; Robert Blair daŭrigis sian Enkondukan kurson. Ron Glossop gvidis kunsidon de AAIE (Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto). Samtempe, Charles Hall prezentis Geneologio per Esperanto kaj Joel Brozovsky parolis pri la E-movado en Japanio. Poste, Ellen Eddy parolis pri siaj Spertoj kun tradukado de infanlibroj kaj Amanda Higley gvidis diskutrondon pri Esperanto sen mitoj. Dua Aferkunsido koincidis kun The Freedom of Esperanto and Jazz, kiun prezentis (angle) Roslyn Kuzmich; (ŝi instruis al ni ludi harmonikon kaj tiel naskiĝis la "Harmonika Armeo de Esperantujo"). Laste, Charles Hall gvidis Diskuton pri familioj kaj Ron Glossop diskutis pri Aspektoj de la tergloba komunumo.

Post vespermanĝo okazis la Distra vespero. Ni ĝuis muzikadon, dancadon, kantadon, jongladon kaj skeĉojn. La Harmonika Armeo de Esperantujo aperis kaj malaperis, senprokraste kaj malbedaŭrinde [la aŭtoro estis unu el la armeanoj – red.] Kelkaj restis post la prezentoj kaj paroladis dum horoj ĝis oni forpelis ilin.

Lunde, antaŭ la Solena fermo, Joe Gamble demandis ĉu Esperanta kulturo estas nature spirita?, Rui Andrade pri Hilelismo: Libro de Zamenhof, Maria Murphy parolis pri la familio de Zamenhof, kaj Lon-

(daŭrigo sur paĝo 2)

Esperanto League for North America  
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530  
USA/USONO  
☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468  
✉ elna@esperanto-usa.org  
www.esperanto-usa.org

*President/Prezidanto:* David T Wolff  
*Vice President/Vicprezidanto:* Grant Goodall  
*Secretary/Sekretario:* Ellen M Eddy  
*Other Board Members/Aliaj estraranoj:* Thomas Alexander, Jennifer Bondelid, Peggy Dolter, D Gary Grady, Angela Harlow, Ralph Lewin, Elizabeth Raible, Orlando E Raola, Derek Roff

*Director, Central Office/Direktoro de la Centra Oficejo:* Joel Brozovsky  
*Vice Director, Central Office/Vicdirektoro de la Centra Oficejo:* Ionel Onet

### esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America  
Dumonata bulteno publikigata de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko  
Vol. 37, No. 4

ISSN 1056-0297

*Editor/Redaktoro:* Ionel Onet

☎ 510/653-0998; 📠 510/653-1468  
✉ ionel@esperanto-usa.org

Materials for esperanto USA should be sent to/Materialojn por esperanto USA oni sendu al:

### esperanto USA

PO Box 1129, El Cerrito CA 94530  
USA/USONO

or by e-mail/aŭ e-poŝte al:

e-usa@esperanto-usa.org

The opinions expressed in this bulletin are those of the authors, and don't necessarily represent the point of view of ELNA or its bulletin/La opinioj esprim-itaj en ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is permitted, provided that due credit is given, and a copy of the reprinted material is sent to ELNA/Estas permesate reaperigi materialojn el ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de la republikigita materialo al ELNA.

Deadline for the next issue/Limdato por la sekva numero: 28.09.2001.

*Sez the Prez*

Saluton ĉiuj,

Volunteers leaving and volunteers arriving seems to have been the theme of the last couple of months.

My thanks and appreciation to Tim Boronczyk, Talent Bank Coordinator. He's been a big help but has run out of time to work on this due to the pressures of college. Now his task is one of the Five Most Wanted (see page 11).

My thanks and appreciation to Binjo Garrett, who collected quarterly reports from the various committees. Binjo did her job with speed and care, but now is too ill to continue. Please send her a get-well note.

All of us have seen and enjoyed the work of Sylvan Zaff, who prepared the four-page *Internacia Manpremo* in previous issues of this newsletter. Sylvan is dropping this work, in part because he feels *Esperanto USA* has improved. I wish he would continue this, but he is determined to move on to other projects. Thank you, Sylvan.

Arriving volunteers? Bill Harris is our new Treasurer. This is a time-consuming and responsible position, one that is a lot of work and too rarely receives any thanks. We are all pleased that Bill is taking on this task.

Also, Nita Jones is our new Commissioner for Complaints. Got a problem? See something that isn't working right? You can complain to the appropriate person as usual, or Nita will forward it for you (anonymously, if you wish). See Nita's article on page 11.

Another new volunteer is Miko Tyson, who will work on getting more Esperanto books into more bookstores. This will help us show the public that Esperanto didn't die out back in the thirties, that it still exists and is still valuable. And David Gaines is a new addition to the Publicity committee; he'll

*(daŭrigo de paĝo 1)*

el ONET (kiu prizorgis la *Libroservon* dum la tuta kongreso) trahakis padon por *Vojaĝo tra la ĝangalo de la Esperanta gazetaro* kun ekzempleroj de gazetoj.

Lasttage, posttagmeze, okazis montekskurso. Ni aŭtobusis al Neĝbirda Monto, kie ni veturis per telfero al la pinto. Restis makuloj de neĝo, preskaŭ degelinta. Neniu neĝbulbatalis, sed Joel Brozovsky jonglis per neĝbuloj. Ni havis sufiĉan tempon rigardi kaj foti la pejzaĝon antaŭ la telfero reportis

work on press releases to mass media.

Also, new Board member Thomas Alexander has volunteered for two tasks, one small and one big. Thomas will work on some public service announcements (PSAs) that might actually be interesting enough to be aired on radio stations. And, he will look into our local groups and consider steps to making them stronger and more effective.

Regarding ELNA's financial situation for a moment... the government is returning some hundreds of dollars to people who paid taxes last year. Are you going to blow it all on maple-walnut ice cream? I didn't think so. How about spending some at the ELNA book service? Or if more Esperanto books would just clutter up your house, how about just sending some money to ELNA? We'll find a good use for it!

This time, a wise old saying from science fiction fandom: "If you don't like crottled greeps, why did you order them?" Why does the Esperanto movement so often order things we don't like? The answers I've come up with so far:

- ☛ I didn't know I didn't like them.
- ☛ I used to like them.
- ☛ They were the cheapest thing on the menu.
- ☛ They were the most expensive thing on the menu.
- ☛ I always order crottled greeps.
- ☛ They're good for me.
- ☛ I thought it was something else.
- ☛ That's what everyone else was having.

Do these make sense? Are you satisfied ordering crottled greeps again? Or is it time to order something else?

Thanks –

David WOLFF, President  
dwolff@world.std.com  
978/264-0286 (8-10pm Eastern time  
weekdays, noon-5pm weekends)

nin malsupren.

Mi povas nur eĥi la vortojn de Joel Brozovsky kaj diri **DANKEGON** al la LKK kaj al Peggy Dolter pro ilia laboro.

**La venontjara kongreso de ELNA certe okazos en Sacramento (Kalifornio), versajne inter la 22a kaj 24a de junio, kun interkona vespero la 21an de junio. Pliaj detaloj sekvos.**

# deNASKa 2001

“Vi iris kien, por fari kion?”

“Ho, mi iris al San-Francisko, por ĉeesti ‘NASK’ – temas pri la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto – ĉi-jare ĉe la Universitato de San-Francisko. Mi estis tie dum du semajnoj.”

“Esperanto? Kio estas tio?”

“Esperanto estas internacia lingvo. Multaj homoj ĉirkaŭ la mondo scipovas ĝin, kaj ĉiun jaron oni studas ĝin en San-Francisko. Ĉi tiun someron okazis tie la 31-a E-kursaro”

“Ha, jes, eble ion mi aŭdis pri tiu lingvo, iam. Sed ĝi tute fiaskis, ĉu ne? Neniu vere parolas tian lingvon en nia mondo. La angla lingvo estas la vera internacia lingvo, fakte.”

“Vi volas diri ke neniu parolas Esperanton? Nu, mi parolas, do vi jam malpravas. Ja, dum la somera kursaro partoprenis 35 studentoj el diversaj landoj... Kostariko, Barato, Ĉinio, Japanio, Kanado, Usono, Senegalio, Meksiko, Svedio. Ili ĉiuj parolas Esperanton,

kaj nun parolas multe pli lerte kaj flue, post du semajnoj dum kiuj oni povis paroli ĝin de unua taglumo ĝis nokto-mezo... kaj eĉ dumnokte. Multaj ja parolas la anglan en nia mondo, sed ĉu ĝi vere estas ‘internacia’

lingvo? Mi dubas...”

“Konsentite, amiko. Mi konsentas ke mi malĝuste diris ke ‘neniu’ parolas tiun lingvon. Ĉu ĝi estas parenca al la Klingona? Mi kredas ke multaj studas ankaŭ tiun ‘artefaritan’ lingvon, ĉu ne?”

“Ne, ne, tute ne parenca al la Klingona, amiko! La Klingona estas nehoma lingvo, kaj ege malfacila. Oni inventis ĝin nur por *Star Trek*. Sed Esperanto estas plene homa lingvo, kiun la kreinto konstruis en la 19-a jarcento, aparte por kunigi homojn. Post cent jaroj, ĝi estas vere ‘viva’ lingvo, kun parolantaro, literaturo. Oni povas eĉ diri ke ek-

zistas Esperanta ‘kulturo’.”

“Sed kion precize vi faris en San-Francisko?”

“Ni studis dividite en du klasoj: unu por ‘progresantoj’ sub la gvido de Grant Goodall. Tiu klaso studis per nova videobendserio *Esperanto: pasporto al la tuta mondo...* kaj mi diru ke la studentoj en la klaso multe laboris kaj multe lernis! La alia klaso okupiĝis pri ‘metodiko de instruado’, kaj ĝin instruis unue Duncan Charters kaj poste Derek Roff. Ili esploris la plej novajn metodojn de instruado, inkluzive de perkomputila instruado. Ĉio, sub la daŭra administrado de Ellen Eddy.”

“Ĉu vi simple restis en klasĉambro dum la tuta tago? Kiel oni eltenis?”

“Ne, la lecionoj okazis nur matene. Dum la posttagmezoj, la studentoj estis liberaj aŭ por fari hejmtaskojn aŭ por ekskursi en la bela urbo. Ĉi-rilate, du lokanoj kiuj ne


plej furoris ideo de Jakobo Schwartz krei vortmagnetojn por ‘surmura poezio’ en la dormeja koridoro.”

“Interese!”

“Kaj ĉi-jare, dank’ al la laboro de Don Harlow kaj Joel Brozovsky, ELNA provizis la studentojn per libroservo dum iu vespero. Ĝi estis furora evento kaj multaj foriris kun brakoj plenaj je libroj.”

“Kiajn librojn? Oni ne farus tion pri la Klingona!”

“En Esperanto ekzistas granda literaturo, kaj originala kaj tradukita. La studentoj aĉetis kompreneble lernolibrojn kaj vortarojn, sed krome ili aĉetis librojn de poezio, noveloj, romanoj, lingvistiko, historio, geografio... el multaj lingvoj kaj multaj mondpartoj. Ĉu vi scias ke oni povas legi kaj *La Hobiton* kaj la tri volumojn de *La Mastro de l’ Ringoj* en bonega Esperanta traduko? Ni estas tute laŭmodaj!”



University of San Francisco 2001

estis studentoj ege helpis: Charlie Galvin kaj Sean Griffin gvidis grupojn al vidindaj lokoj, ekzemple al la Muzeo de la ‘Legion of Honor’, al la Muzeo de Azia Arto, al la Ĉina kvartalo, al la kvartalo Castro ktp. Kaj alia lokano, Don Harlow, gvidis ekskurson sur la monto Tamalpais. Iun posttagmezon grupo veturis per buso trans la fame konatan ponton Ora Pordego ĝis la urbeto Sausalito kaj revenis per pramŝipo. Cetere, dank’ al Amanda Higley, okazis multaj interesaj vesperaj programeroj. Ekzemple, kandelfarado, sablopenetrado, ludoj, kantoj, dancoj, prelegoj (ekzemple pri la ĉina pentrarto ktp.)...

antoj multe verkis kaj kontribuis rakontojn kaj artikolojn... kaj tiel plibonigis sian lingvoscion. Kolego mia, Tim Westover, prizorgis retpaĝaron por la kursaro, en kiun li metis ĉiun tagon la gravajn partojn el la ĵurnalo kaj multajn fotojn. Rigardu ĝin ĉe <http://www.literaturo.net/nask/>.”

“Mi miras pri via sperto. Nenian ideon mi havis pri tia lingvo. Eble mi devus lerni ĝin...”

“Kial ne? Venontjare vi povus esti studento en San-Francisko, ĉu ne? Ni komencu! En Esperanto, oni diras ‘Saluton!’...”

Lee MILLER, Columbia MO

“Ĉu vere la verkojn de Tolkien oni havas en Esperanto? Mirinde!”

“Jes, tute vere. Mia propra laboro dum la kursaro estis redakti kaj eldoni tagan ĵurnalon por la studentoj kaj instruistoj. Ni uzis ĝin por anoncoj kaj informoj, certe, sed la stud-

# Volunteers make the world go 'round

Joel BROZOVSKY

A quick quiz: What year is this? The year 2001, you say? Yes, but what year is it according to the United Nations Organization? Ha! Not so easy, is it? There may be more than one answer, but the one I'm aiming at is this: UNO has declared the year 2001 to be the **Year of Volunteers**.

The Esperanto movement has always been carried primarily through volunteers, and probably will continue that way in the future, in spite of calls to "professionalize" it. Even if parts of the activities are guided more and more by professionals, the real work on a local level will still be carried on mostly by volunteers. And even in the Esperanto Centers, those of us who have made Esperanto our profession still need the help of volunteers to keep things going smoothly.

Volunteering is one of the best ways for an individual to become involved, and to feel like part of the group or movement. It is a great feeling, to be useful, and to support a movement or organization with worthy goals!

ELNA has many volunteers, and literally could not exist without them. Starting with the Board of Directors (even though they are elected, their service is entirely voluntary; that is, unpaid) and the many commissioners, the list continues to include everyone who offers her or his time to promote Esperanto, to organize a local group, teach a class, write a letter to the editor of a newspaper, etc.

We in the Central Office enjoy the help of volunteers also. There are regular volunteers, without which we could not provide the depth of services now offered. And there are "irregular" volunteers — people who find themselves in the Bay Area with some time, and come to the office to help. This summer, several such volunteers have brought a breath of fresh air to the office by doing some sorting, filing, and other kinds of tasks that had been put off for, in some cases, years. One result is a much more orderly and cleaner office.

Some of these volunteers aren't even members of ELNA — they live in other countries, but offered their time to help us here. The first is Leonora GONZÁLEZ from Mexico, who stayed to help out in the office for two weeks after attending the NASK courses in San Francisco (in the photo she

poses in front of Alcatraz Island). Sorting through old books and brochures, filing several years' worth of paid bills and receipts, helping to send out information packets and the new Member List: Leonora was a great help.

As Leonora was getting ready to fly back to Mexico, two young travelers from France arrived from the other side of the Pacific. Rachel PRUAL and David CHOLET stayed ten days in California in the middle of their two-year voyage around the world. (Information about their voyage and its progress can be found at <http://mondepouce.ctw.net>.) They spent one day helping in the office, cleaning and straightening things, and cutting postage stamps off of envelopes. (We send used postage stamps to UEA, who sells them to help support their activities. Here is an easy way to help out: save your used postage stamps and send them either to us or directly to UEA.) They said that since they are full-time travelers, they prefer to do some useful work rather than go sight-seeing. I understand this attitude very well: when I was on my three-year around the world voyage, I often felt a need for a "work break", and volunteered in several Esperanto organizations.

In August a small group of young enthusiasts from all over the US converged on the Central Office for an extended weekend of volunteering, under the name "JES!" (Junulara Esperanto-Semajnfino). This was a real house-cleaning: many boxes of old papers, bulletins, catalogs, member lists etc. were thrown out to make room for current activities; material for the archives was sorted and repacked, and a lot of previously hidden carpet became visible. Some of the time-consuming work of cataloging audio tapes got done also.

What better way to celebrate the Year of Volunteers than to become one yourself? There are many opportunities within the Esperanto movement at local, national and international levels. For volunteering at the Central Office, contact us at — you guessed it — the Central Office. For opportunities to help out in other places (there are many! See the president's message on page 2 and *Five Most Wanted* on page 11), including working from your own home, contact our President David WOLFF (see page 2).

MAKING A DIFFERENCE


## ESPERANTISTS WORK TO AVOID BLINDNESS

In many parts of the world, visual impairment is a burden that makes life difficult or even impossible, because of a lack of facilities and treatment for the visually handicapped. Much of the suffering could easily be avoided through treatment, corrective lenses, or other aids for the blind. It was the knowledge of the large-scale unnecessary suffering that inspired a group of Esperantists based in the Netherlands to take action to alleviate as much of the suffering as possible.

The foundation, called "E-vid-e-nt-e" (an Esperanto word meaning "evidently" or "obviously", but incorporating several puns), has been working for 35 years to bring volunteer ophthalmologists and opticians into areas where the people don't have access to such services, to distribute eyeglasses, and to help set up support networks for the blind or near-blind. They are active in such countries as Sri Lanka, Romania, Albania, Bulgaria, and several parts of Africa.

The constant force behind this effort is Jacques Tuinder, together with his wife Vera. The foundation uses Nederlands (Dutch) as well as Esperanto in its fundraising activities. It maintains its policy of using 100% of contributions for its programs, meaning that any expenses for fundraising, research, implementation, etc. are carried by the volunteers who do it.

Contributions as well as requests for information are always welcome at: Jacques TUINDER, E-vid-e-nt-e, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk, Netherlands. Contributions can be sent to the UEA account for E-vid-e-nt-e [jajt-s], or through ELNA. *Joel B.*



# KIEL FARTAS FAMILIO BONVOLO?

Bone, dankon! La \$83 000 de Esperantic Studies Foundation (ESF) alvenis ĝustatempe por ebligi la finredaktadon de lecionoj 9-12, reproduktadon kaj dissendadon.

Stefan MacGill finfine sukcesis prepari la ekzercarojn por lecionoj 9-12 ĝustatempe por uzo en la kurso ĉe la Universitato de San Francisco, dum NASKE (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto). La vidbendoj kaj tekstoj de lecionoj 9-12 estas jam dissenditaj al ĉiuj mendintoj, kaj fine de la

Rezulte, *Esperanto – Pasporto al la tuta mondo* ne plu ŝuldas monon al la ĝenerala kaso de ELNA. ESF ankaŭ kunlaboros por disvastigi la uzadon de la bendoj kaj ankaŭ planas krei pli da elektronikaj materialoj por akompani la kurson.

Ĉi-somere NASKE dediĉis sin al uzo de *Pasporto* kaj aliaj vidbendaj kaj elektronikaj metodoj por instrui Esperanton – tre sukcese, kaj ni intencas daŭrigi help-prezentadojn ĉe Esperantaj kunvenoj. Nia vicpre-

la daŭran interesiĝon pri *Pasporto*.

Pro la fakto ke plejparte la esperantistoj ne estas profesiuloj pri lingvo-instruado, ni devas prepari por ili gvidlibron pri kiel plej efike utiligi la materialojn. Tial, mi petis d-ron Duncan Charters verki tian libron. Esperable ĝi estos baldaŭ preta.

## LUMO VIDEBLAS ĈE LA FINO DE LA TUNELO

Jes, ni ĝis nun multe sukcesis en ĉi tiu aŭdaca projekto kaj la fino videblas. Tamen ni ankoraŭ bezonas proks. \$34 000 por finredakti lecionojn 13, 14 kaj 15. Se vi povas iom helpi al tio, bonege!

Spite al la fakto ke ni ankoraŭ ne tute finis la serion, ni sugestas ke lokaj kluboj jam nun montru unu lecionon dum ĉiu monata kunveno. Ĉiu leciono daŭras nur 30 minutojn, do ĝi ne devas okupi tutan programon. Eĉ spertaj esperantistoj ĝuos la rakonton kaj ricevos instigon pli ofte pensi Esperante. La ekzercoj mem estas ĝuindaj. Komencantoj tamen devus ofte spekti la vidbendon, por ke Esperanto eniru ĉiutagajn pensojn.

Ankaŭ nun estas la tempo plani por eventuala uzado de kablaj kaj televidaj stacioj. Notu kiel aliaj vidbendoj por instrui lingvojn montriĝas televide kaj pripensu kiel enkonduki niajn materialojn. Ni plenumu la deziron de la Familio Bonvolo – krei pli kaj pli da esperantistoj!

Lusi HARMON  
ELNA-Komisiito



somero tiuj samaj mendintoj ricevos la ekzercojn.

SE VI JAM MENDIS LEClONOJN 9-12 KAJ NE RICEVIS ILIN, NEPRE INFORMU MIN!

ESF kontribuis sufiĉe da mono por redakti ĝis leciono 12 kaj por repagi la ŝuldon de la projekto al la ĝenerala kaso de ELNA.

zidanto, d-ro Grant Goodall, kun la helpo de ESF, faris prezentadon pri “Kial kaj kiel uzi *Pasporton*” ĉe la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Meksiko, ĉe la ELNA-kongreso en Salt Lake City kaj ĉe la UK en Zagrebo. Grant preskaŭ ne videblas en ĉi tiu foto, sed la grandeco de la aŭdantaro montras

## ESPERANTO ON TAPE

### Is Esperanto for everyone?

*We usually think of the Esperanto Movement as being completely open to anyone: all are welcome to learn and use the language, to join the organizations and take part in the activities. That is even written into our statutes. However, there are people who may feel rather left out, not due to our conscious exclusion, but because of our oblivious omission. Those with reading handicaps (visually impaired or dyslexic) have a much greater challenge in finding adequate learning materials than those who can read printed words. There are some tapes of Esperanto radio broadcasts or lectures, some pronunciation tapes, but no real course on tape in English. And not much literature.*

ELNA member Kathleen WEBER writes from an insider's perspective.

Many students who would like to read books in a second language or learn a second language cannot do so due to a reading disability. Second language learners, including students, find that the books they require are unavailable in a nonprint format because of a shortage of readers to record them. For Esperanto, a reader must have good pronunciation and live within convenient traveling distance of a studio.

RFB&D (Recording for the Blind & Dyslexic) is a national nonprofit organization that maintains offices and/or recording studios at many locations around the country in states AZ, CA, CO, CT, DC, FL, GA, IL, KY, MA, MI, NJ, NY, PA, TN, TX and VA (see their website at [www.rfbd.org](http://www.rfbd.org)). If you would like to read, but feel that your Esperanto is not yet good enough, reader shortages exist in other languages too, including English.

Memberships for reading disabled students and library users are \$50. Memberships within the USA for the Library of Congress system are free, as are the 8 wpm machines necessary to read the tapes. Walkman-style reading machines and the *Panasonic Classmate*, which has light touch buttons and is compact, are available from RFB&D and can be used to record lectures. Students may even request books from overseas if they can pay postage.

Many teachers of Esperanto may not be aware of these services. Esperantists who enjoy reading aloud can be of great service to those with reading handicaps by volunteering to read in a RFB&D studio. Contact the ELNA office for a list of works that have been requested, or to propose a book to read.

Kathleen WEBER

Tip!

## Get Clued In About USEJ - Join Its Email Groups!

Did you hear about this August's Youth Esperanto Weekends in San Francisco and New York? No?

The U.S. Esperanto Youth Organization is doing a lot of fun stuff these days, but we only have two ways of getting the news out about our activities: the one in your hands (*Esperanto USA*) and our two email groups, 'usej-diskuto' and 'usej-anoncoj'.

Since *Esperanto USA* comes out only every two months, and we're spontaneous whimsical types who like to plan things at the last minute, we announce about our activities almost exclusively by email. So if you don't want to miss out on our Interretaj Babilfestoj (Chat Parties), Free Book Exchange (only at usej-diskuto!), regional Youth Esperanto Weekends and more, we suggest you get clued in by joining one of our email groups!

What's an email group? It's an email mailing list that you voluntarily join. When someone sends an email to the group's email address, all the members get it, and when one of the members responds, everybody gets the response. Don't worry about getting buried under mountains of messages; first of all, we don't exchange that many, and second, you can choose to receive each day's emails all clumped together in one big email, called a 'Daily Digest'. Plus, you can delete the emails and still read them again later because all messages are saved in the group's archive.

Email groups are an incredibly effective tool for getting urgent news out and making a difference! For example, when a few months ago there was some negative coverage of Esperanto on National Public Radio and Public Radio International, the 'AktivUsono' email group got the news out instantly. Esperanto speakers sent so many

## ELNA Conference in Salt Lake City, May 2001

When I found out the ELNA conference for 2001 was going to be held in my home state, I decided to attend. Having only attended NASK last year, I'm not the best Esperantist. However, I always love a chance to practice another language (and have a little vacation at the same time!) So, my sister and I packed our bags and headed a few hours south for Salt Lake City. We had lots of fun learning yoga from Abdul, enjoying everybody's company at the banquet, and participating in many other fun activities. We met many people from around the country and enjoyed learning about their perspectives and experiences. That's what I like about learning Esperanto (or any language, for that matter.) The people I meet are unique, fun, interesting, and incredible – and there was no lack of such people at the ELNA conference of 2001. Thanks to all for a fun weekend!

Amy WHITE (Richmond UT)

protest emails to NPR / PRI that they did a public apology announcement AND another more positive story about Esperanto, saying they'd never gotten that much of a response from one story before!

'USEJ-diskuto' is our bigger group, used for general discussion, and 'USEJ Anoncoj' is for people who only want announcements from the USEJ Board. Don't worry if you're not fluent in Esperanto – we post all announcements in English as well! Here's how to join:

1. Go to [www.yahogroups.com](http://www.yahogroups.com)
2. Find the 'search' field and type 'usej-diskuto' or 'usej-anoncoj'
3. Click on 'Join This Group!' (note: you can't read the archive without joining)
4. If you've never used yahogroups before, click 'Sign Up Now' & fill out the form (tip: please choose a Yahoo ID based on your first & last names if possible)
5. Choose your message delivery method (I recommend 'Daily Digest') and click 'Join'

Once you're in, click on 'messages' at the left to read the archive, 'files' to access the Free Book Exchange (Virtuala Biblioteko), and 'members' to see who's in the group and read their profile.

Amanda HIGLEY

## USEJ Needs Members!

Got any wild and crazy ideas about how to convince your young friends to join USEJ? We KNOW there are several hundred young Esperanto-speakers in the U.S., but only 40-something are members of USEJ! Kinda pitiful, don't you agree? It makes it difficult to keep non-members informed – we have updated contact information only for members, and we don't want anyone left out of the loop! So if you know a young Esperanto-speaker, please ask them if they're a member of ELNA/USEJ, and if they're not, please encourage them to join online at [www.esperanto-usa.org](http://www.esperanto-usa.org), or call 510/653-0998. If they can't afford it, there might be financial aid available – tell them to contact the ELNA Central Office.

Amanda HIGLEY

## Redaktora angulo

Uf! Finfine mi povas pli facile spiri. Unue, ĉar nova numero de *Esperanto USA* pretas por sendo al la presejo kaj due, ĉar mi revenis al pli elteneblaj temperaturoj post kvar semajnoj da varmeg-torturo en Centra Eŭropo.

Ne necesas atentigi vin ke ĉi tiu numero de *Esperanto USA* malfruas: vi ja konstatis tion tute solaj. Mi feris en la Malnova Mondo kaj revenis elĉerpita, por ataki la monton da laboro atendanta min. Evidentiĝis ke ne ĉio estas tiel facila kiel oni antaŭvidas ĝin: anstataŭ okupiĝi pri la redakta laboro, kiel mi antaŭplanis, mi devis okupiĝi pri junaj volontuloj, kiuj iom ordigis kaj purigis nian oficejon (dankon, ĉiuj!) – tiel pasis la unua labora semajnfino. Poste, montriĝis ke pro la ordigo mi ne trovas aĵojn, kiujn mi facile trovis en la antaŭa malordo: pli da malŝparita tempo. Kaj, por ne eskapi tiel facile, mi devis atentigi kelkajn kunlaborantojn ke jam antaŭ tri semajnoj pasis la datlimo, antaŭ kiu ili devintus sendi al mi siajn kontribuojn. Finfine mi sukcesis... iel. La vetero sendube helpis, mal-kiel en Eŭropo kie konstante mi "ĝuis" temperaturojn superantajn 30 gradojn (celsiusajn).

